

BRAZILA ESPERANTISTO

63-A JARO

SEPTEMBRO - DECEMBRO 1969

N.º 666-669

ESTRARO DE B.E.L. EN 1909



De maldekstre: João Baptista Mello e Souza, 1-a Sekretario; Ingeniero Alberto Couto Fernandes, Prezianto; Prof. D-ro Everardo Backheuser, Honora Prezianto; D-ro João Keating, Vicprezianto; Ingeniero Hernani Motta Mendes, 2-a Sekretario; Edmundo Felix Tribouillet, Kasisto.

BRAZILA ESPERANTISTO

("O Esperantista Brasileiro")

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara
dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal):

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 2.º

Telefone: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZIL

Senpaga por anoj de B. E. L.

Eksterlande: 18 steloj aŭ 15

respondkuponoj

QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

(De acordo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

Membro simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazila Esperantisto"	12,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	35,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	50,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	75,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 10 vèzes a quota dèste.	
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 20 vèzes a quota dèste.	

Tôdas as importâncias devem ser remetidas em cheque pagável no Rio de Janeiro à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º

Rio de Janeiro, GB

CURSOS POR CORRESPONDENCIA

A B.E.L. mantém Cursos por Correspondência de três graus com diplomas, conferidos em nome da Academia de Esperanto.

O CURSO ELEMENTAR (10 lições) ministra o conhecimento do Esperanto para as necessidades da vida quotidiana. Com o cartão de matrícula o aluno recebe o livro adotado e fica inscrito no Movimento com a categoria AM.

Contribuição única .. NCr\$ 30,00

O CURSO SUPERIOR (15 lições) prepara para o emprêgo do idioma, com correção e justeza, em assuntos literários. Além da FUNDAMENTA KRESTOMATIO o estudante possuirá o PLENA VORTARO DE ESPERANTO.

Contribuição única .. NCr\$ 40,00

O CURSO MAGISTRAL (20 lições), essencialmente técnico, destina-se sobretudo a professores que desejem especializar-se no ensino da Língua Internacional.

Contribuição única .. NCr\$ 60,00

A contribuição para cada curso é paga adiantadamente e de uma só vez...

Taxas de exame e diploma — NCr\$ 30,00, 40,00 e 60,00 respectivamente.

Para os graus superiores é exigido o diploma de grau inferior.

Traduções de Zamenhof

Georgo Dandin, <i>Molière</i>	8,00
Ifigenio en Taŭrido, <i>Goethe</i>	8,00
La Rabeno de Bahraĥ, <i>Heine</i>	
e La Gimnazio, <i>ŝalom Aleĥnem</i>	8,00

O ESTUDO DA LÍNGUA E A INSCRIÇÃO DE MEMBROS

TAREFA PRIMORDIAL DAS SOCIEDADES FILIADAS

A inscrição no nosso Movimento de algumas dezenas de alunos dos cursos da Associação Baiana de Esperanto sugeriu-nos o tema para a nota liminar deste número do nosso boletim. Não temos dúvida de que os fins primordiais das sociedades filiadas são os enunciados no título desta nota. Efetivamente cabe a tais sociedades sobretudo difundir o conhecimento do Esperanto e contribuir para o crescimento das associações representativas.

Os dois fins são intimamente ligados, fato que foi claramente percebido por algumas instituições, como o Brazila Klubo "Esperanto", do Rio de Janeiro, e a Sociedade Mineira, a que se vem juntar a Associação Baiana.

É de certo modo estranhável que, anunciando-se cursos até com centenas de alunos, deles não venham outros tantos membros para o Movimento. Geralmente as pessoas que procuram os nossos cursos estão interessadas na propagação do Esperanto. Bastaria que fossem informadas de que o Esperanto é, sem dúvida, um idioma, mas um idioma que está ao serviço de nobre Movimento, ao mesmo tempo idealista e prático. Já houve quem dissesse que, segundo parece, os esperantistas amam tão entranhadamente a sua língua que sentem ciúmes dela e receiam

ter de partilhar com outros o seu conhecimento e uso.

Por outro lado, continua em plena validade o princípio definido na Declaração de Bolonha-do-Mar, no I Congresso Universal de Esperanto, segundo o qual *esperantista é aquele que sabe e usa o Esperanto*. Não basta desejar ardentemente que os Governos de todos os países adotem compulsoriamente a língua. Para os esperantistas, que convictamente sabem que, antes mesmo dessa adoção, o Esperanto funciona no mundo inteiro pelos seus delegados, seus clubes, sua imprensa, sua literatura, é preciso alguma coisa mais, é mister dominar bem a língua que apregoamos.

Estudemos e ensinemos o Esperanto como ele merece pela sua beleza, sua utilidade e sua idéia interna. Convidemos para o nosso caro Movimento todos aqueles que tomarem contacto com ele. O robustecimento das nossas fileiras, que disso resultará, dar-nos-á vigor para novas conquistas. Não nos esqueçamos que uma idéia, embora excelente em si mesma, exige muitas vezes o apoio do número de adéptos.

Para o ano que se aproxima trabalhe-mos, pois, com o duplo escopo: NOVOS CURSOS e NOVOS MEMBROS.

MEUS PENSARES

A Carlos Domingues

L. L. Zamenhof, "Mia Penso" (1)

Certa vez ao campo eu fôra,
 Numa noite de luar.
 Linda jovem, cismadora,
 Docemente ouvi cantar.
 Era um canto de esperança,
 De venturas, e de amor.
 Ressurgia-me a lembrança,
 De profunda e antiga dor.

"Oh! — disse ela. — Tu dormias?
 Tão calado agora estás!
 Que saudades tão sombrias
 O meu canto assim te traz?"
 Coração, resiste ainda...
 Não te fica bem chorar
 Junto de uma jovem linda
 Numa noite de luar...

Teus pesares e tormentos
 Já se foram, coração;
 Deixa escuros pensamentos
 Que tão longe, longe vão...
 Entristece-te a saudade
 De outros tempos, eu bem sei;
 Choras hoje a mocidade
 Que ao dever sacrifiquei...

Quantas vêzes de alegria
 Me cercavam! No meu ser,
 Chama ardente renascia;
 Eu quisera assim viver.
 Mas, se a dura e ingrata sorte
 Contra mim constante fôr,
 Bem melhor parece a morte
 Na esperança; e longe a dor!...

(1) Inteiramente absorvido, desde a adolescência, pelo ideal do idioma internacional, Lázaro Ludovico Zamenhof não pôde fruir os prazeres próprios da mocidade. É o que lamenta nesta poesia, expansão de sua mágoa sem remédio, pela perda da juventude, assim sacrificada em favor da missão que o destino lhe impôs. Mais tarde, na poesia "Ho mia kor!" ("Oh, meu coração!") o grande idealista alude àquelas lutas, alentado, então, pela esperança que o animava.

A tradução desta poesia e a nota são do livro "Sete Lendas de Amor e outras poesias" de J. Meluza (João Baptista Mello e Souza)

La Universala Frateco

J. B. Mello e Souza

Sur ondegoj malpacemaj
 De profunda, nigra mar',
 En ŝipet' iras sentime
 Pelj kuraĝa maristar'.
 Estas tero malproksima,
 Ocean' montriĝas nur;
 Sur akvaro la senlima
 Ne briletas ja lumtur'.

Kaj la nokt' estas malhela,
 Sed ŝipet' antaŭen iras
 Sub ĉiel', arkaĵ' senstela...

"Kien iras vi, ŝipistoj,
 Sur dezerta l'ocean'?"
 Ĉu la morton vi ne timas
 Pro koler' de l'uragan'?"
 Kien iras vi, bravuloj,
 Kion, fratoj, celas vi?
 Nur riferoj, ne insuloj
 Ja troviĝas tie ĉi".

Kaj de l' vento forpuŝata
 La ŝipet' antaŭen iras
 Sur akvaro la malglata.

"Niajn hejmojn forlasinte
 Ni foriris el Patruj"
 Al haveno ni vojaĝas;
 Ĝi aperos, certe, tuj...
 Ke ĉiel' bela farigos,
 Kaj ne estos plu danĝer',
 Ke la maro trankviliĝos
 Nin certigas la esper'."

Ventoj ĉesas. En ĉielo,
 Inter nuboj, tremetante,
 Ekbriletas luma stelo...

Al ŝipistoj nun similaj
 Ni laboras kun fervor'.
 Ĉiujn barojn ni faligos
 Nur kun amo en la kor'.
 La espero nin protektas,
 Dum vojaĝo regas ĝoj'.
 Verda Stelo nin direktas
 Tra la tuta longa voj'!

Al laboro, kolegaro!
 Ni daŭrigu, kuncelante
 La Fratecon de l'Homaro.

O original "Mia Penso" está em Fundamenta Krestomatio, pg. 302 e em Originala Verkaro, pg. 589

NEKLOLOGO



JOÃO BAPTISTA MELLO E SOUZA

Nia eminenta pionirio Prof. D-ro João Baptista Mello e Souza forpasis 81-jara en Rio de Janeiro la 27-an de Aŭgusto lasta.

Li naskiĝis en Queluz, São Paulo, la 28-an de Majo 1888 kaj diplomiĝis pri juro en Rio de Janeiro.

Jam en 1907, kiam estis fondita Brazila Ligo Esperantista, la hodiaŭa Brazila Esperanto-Ligo, li fariĝis agema kaj sindona membro, kaj restis fidela dum sia tuta vivo al nia idealo, al kiu li konstante kaj senĉese donis sian inteligentan laboron.

Rimarkinda fakto de lia esperantisteco estis la partopreno en la 6-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Washington en la jaro 1910. Tie li estis oficiala delegito de la Brazila Registaro kaj de la Ligo kaj sukcesis venki en Internacia Poezia Konkurso, en kiu li konkuris kun famkonataj poetoj esperantistaj. En alia loko ni aperigas la poeziaĵon "La Universala Frateco", kiu ricevis la 1-an premion. Tiam li konatiĝis persone kun D-ro

L. L. Zamenhof kaj ili fariĝis bonaj amikoj. Nun Mello e Souza estis la lasta brazilano, kiu havis la honoron koni nian Majstron.

Triumfinte en Washington, Mello e Souza daŭrigis sian aktivecon por Esperanto en multaj medioj. Li skribis en gazetoj kaj precipe en Brazila Esperantisto, kiu enhavas multajn liajn artikolojn. En ĉiuj lernejoj, kie li instruis Historion, li trovis okazon ankaŭ instrui Esperanton. Elokventa oratoro, li faris sennombrajn paroladojn kaj prelegojn pri nia lingvo, precipe li ŝatis paroli pri "Lando de Amikeco" tio estas Esperantujo; en tiu aktiveco ofte kunlaboris li kaj lia frato, alia konata verkisto kaj prelegisto — Julio Cesar Mello e Souza (Malba Tahan).

Kiam li okupis administrajn postenojn, li povis ofte antaŭenigi nian aferon. Kiel ĝenerala sekretario de la Organiza Komitato de la Nacia Ekspozicio Memoriga pri la Centjaro de la Sendependeco de Brazilo, en 1922, li kontribuis al la enkonduko de E-o inter la uzatajn lingvojn. Sekretario de la tiama Ministerio de Internaj Aferoj kaj Justeco li agis, por ke nia lando estu reprezentita oficiale en Universalaj Kongresoj. Oni povas aserti, ke Mello e Souza metis ĉiam al la servo de E-o sian prestiĝon kaj sian socian influon.

Kun granda brilo li prezidis la 14-an Brazilan Kongreson de Esperanto kunvenintan en Curitiba 1954; li estis prezidanto de la Organiza Komitato de la 3-a Eŭkaristia Esperantista Mondkunveno en Rio de Janeiro 1955, kaj de la Organiza Komitato de la 19-a Brazila Kongreso de Esperanto, en Rio de Janeiro 1965.

En 1952 Mello e Souza post vizito al Usono, kie li havis multajn amikojn esperantistajn kaj neespe-

rantistajn, denove reprezentis nian Ligon en Universala Kongreso, la 37-a, kiu okazis en Oslo.

La ĉefa evento de la esp-ista vivo de Mello e Souza estis laŭ li la parto, kiun li havis en la solena prezento al Unuiĝintaj Nacioj en Lake Success 1950 de la grandega petskribo, kiu formis dek vastampleksajn kajerojn kaj en kiu pli ol 16 milionoj da subskribintoj pledis por Esperanto. Uzante unu el la oficialaj lingvoj de U.N., li paroladis en franca lingvo. Estas menciinde, ke por tiu petskribo li varbis en Brazilo pli ol 200.000 subskribojn.

De multaj jaroj Brazilia Klubo Esperanto, nia veterana societo, havis lin kiel prezidanton, al kiu la Klubo ŝuldas bonajn servojn. Tie lia natura eksterordinara spriteco ofte montriĝis kun granda plaĉo kaj aplaŭdoj de la ĉeestantoj.

Kiel sia kara patrino, S-ino Carolina Mello e Souza, li estis antaŭ ĉio instruisto kaj edukisto, kaj pri tio li havis veran fieron. Katedra profesoro de Historio, scienco kiun li profunde amis, li estis en Instituto de Edukado, Kolegio Pedro II, Universitato de Ŝtato Guanabara kaj Fakultato de Filozofio Sankta Ursulino.

Aktiva ĵurnalistoj, en certa fazo de sia vivo li estis redaktisto de la grava ĵurnalo "O Imparcial" kaj havis la pseŭdonimon "Meluza".

Poeto, romanisto, aŭtoro de porinfanaj libroj; Mello e Souza postlasas vastan verkaron: Canções da Escola e do Lar, Uma Viagem Pelas Estrelas, Majupira, Estudantes do Meu Tempo, Teatro Grego, Meninos de Queluz, Cliomania, A Sombra do Bambual, diversaj lernejaĵ libroj kaj tezoj kaj Histórias do Rio Paraíba, el kiu Brazilia Esperantisto (Okt.-Dec. 60) publikigis la rakonton Victor Inn tradukitan de Floriano Pessoa.

Por Esperanto li verkis "Que é o Esperanto?" kaj "Tra la Mondo", ŝatatajn broŝurojn de informado, kaj tradukis la rakonton "Firmo, La Bovgardisto" de Coelho Neto por "Antologio de Brazilaj Rakontoj".

Mello e Souza estis flua kaj inspirita poeto en la du lingvoj. Li verkis originale kaj faris ankaŭ perfektajn tradukojn kiel ekzemple de la popolaj versaĵoj de Ademar Tavares. Al B.E.L. li transdonis por eldono la originalon de poezia verko, kiu kunigas liajn diverstempajn laboraĵojn.

Entusiasma skoltestro, Mello e Souza prezidis la Brazilan Federacion de Skoltistoj. Li estis fakdelegito por skoltismo. Membro de la Brazilia Societo de Geografio, kies ĝenerala sekretario li estis, kaj membro de la Beletristika Akademio de Rio de Janeiro, li rimarkinde agis en la du institucioj. Li estis prezidanto de "Centro Paulista".

Li estis direktoro de Instituto de Edukado kaj de Kolegio Pedro II (Suda Sekcio).

La enterigon de la kara amiko, kiu lasas en niaj vicoj neplenigeblan malplenenon, ĉeestis Prof. D-ro Carlos Domingues, S-ro Getúlio Soares de Araujo kaj Kolonelo Jorge Campos de Oliveira, kiuj reprezentis Brasilan Esperanto-Ligon kaj Brazilan Klubon Esperanto.

Brazilia Esperantisto prezentas al la vidvino, S-ino Dulce Mello e Souza, kaj al la ceteraj familianoj sian plej sinceran kondolencon.

JERÔNIMO DOS SANTOS

Nia samideano Prof. Jerônimo dos Santos mortis en Natal la 30-an de Majo.

Li estis pioniro en la ŝtato kaj konservis ĝis sia morto 82-jara fidelecon al Esperanto.

Aperfeiçoe o seu Conhecimento

... "Comecei, então, a evitar traduções literais, pensando diretamente na língua neutra. Daí por diante, senti que, em minhas mãos, ela deixava de ser mera sombra, sem base, dêste ou daquele idioma, com que eu lidava no momento; agora possuía espírito próprio, vida própria, fisionomia bem definida e claramente expressa, livre de quaisquer influências".

Zamenhof

Traduza o trecho abaixo e aguarde o próximo número da revista, para confrontar seu trabalho com nossa tradução. Colha ensinamentos, estudando os pontos de divergência.

OS DEDOS MAGROS DA POBREZA

José Mauro de Vasconcelos

— Graxa, freguês!

— Graxa, patrão. Graxa para ajudar o Natal dos pobres!

Um carro de rico parou perto.

Eu aproveitei para gritar sem esperança alguma.

— Uma mãozinha, doutor. Só para ajudar o Natal dos pobres!

A senhora bem vestida e os meninos atrás no carro ficaram me espiando, espiando. A senhora se moveu.

— Coitadinho, tão pequeno e tão pobrezinho. Dê qualquer coisa a êle, Artur.

Mas o homem me analisou, desconfiado.

— Isso é malandrinho e dos vivos. Êle está se aproveitando do tamanho e do dia.

— Mesmo assim eu vou dar. Vem cá, menininho.

Abriu a bolsa e esticou a mão pela janela.

— Não, senhora, obrigado. Eu não estou mentindo, não. Só quem

precisa muito trabalha num dia de Natal.

Apanhei a caixa e coloquei no ombro e fui andando devagar. Hoje não tinha nem mais força de ter raiva.

Mas a porta do carro abriu-se e um menininho desatou a correr para perto de mim.

— Tome, garôto. Mamãe mandou dizer que ela não acredita que você seja mentiroso, não. Botou mais quinhentos réis no meu bôlso e nem esperou que agradecesse... Só ouvi o ronco do motor se afastando.

Quatro horas já tinham passado e eu continuava com os olhos de Papai me martirizando.

Fui procurando o caminho de volta.

Os leitores que desejarem corresponder-se sobre a tradução, queiram dirigir-se diretamente ao tradutor: Gen. Geraldo Pádua, R. Ouro Preto 1161 ap. 202, Belo Horizonte.

PARA APERFEIÇOAMENTO

William Auld

PAŖOJ AL PLENA POSEDO

Progresiga legolibro de
Esperanto kun lingvaj
ekzercoj NCr\$ 16,00

A. Mazzolini

EKZERCILO-HELPILO

Por Supera Praktika Kurso de Esperanto - 2 vol. NCr\$ 9,00

Para Curso Superior

Fundamenta Kretomatio	NCr\$ 20,00
Plena Vortaro de Esperanto	NCr\$ 20,00
Esperanto sem Mestre	NCr\$ 12,00

LA BIBLIO KAJ LA POEZIO DE LA PLANTOJ

NILSON JOSÉ DA SILVA SOUZA

La arboj estas la unuaj vegetaĵoj, kiuj inspiris la patriarkojn kaj profetojn de la Malnova Testamento.

La vito (vinberujo), simbolo de ĝojo de la animo, estis tradicia imago de la hebrea popolo. La lebanona cedro, en la poezia stilo de la profetoj, uzata laŭlitere aŭ laŭ figura senco, estas la emblemo de la alteco. La cipreso, centjara planto kiel la cedro, simbolas la doloron kaj la morton. Dediĉita al la animoj de la mortintaj Romanoj, tia ideo pri la cipreso influis ĝis la moderna epoko al la poezia lingvaĵo de la romantikuloj. La pino, arbo respektigata kvazaŭ per idolkulto, same kiel la kverko, simbolas la forlikecon, kaj tion memorigas ĝia graveco dum la civilaj kaj religiaj ceremonioj pratempaj, ekzemple ĉe la druidoj. La olivarbo, tre citata, ekde la Genezo, kiam la kolombo revenis en la arkeon, havanta en sia buŝo folion de olivarbo, estas simbolo de pieco kaj paco. La junko, kiun Dio elkreskigis sur la kapo de Jona. La hedero, kiu kronis la antikvajn poetojn. La absinto, signifanta amarecon maldolcecon, kies evidenta simbolismo la Apokalipso vidigas kiam la evangeliisto diras: "la nomo de la stelo estas Absinto". La akacio, arbo sankta en Egiptujo, el kies ligno oni konstruis la Tabernaklon, la Keston de Interligo kaj la Tablon de la Panoj de Propono. La granatarbo, kies frukto vere estas bela. La bardo de la Alta Kanto de Salomono diras, ke la vangoj de lia amatino aspektas kiel peco de granato. La figarbo, eble de la profetoj la plej citata vegetaĵo. Estas citado pri aliaj plantoj, sed ni limigos nin al cito de tiuj.

La simbologio semida, speciale tiu de la vegetaĵoj, klarigas la noblajn konceptojn de la orienta poezio kaj trapezetos la tutan poetikon okcidentan.

Ĉe la Alta Kanto de Salomono vera paŝtista eklogo, mi trovos:

"5.13 — Liaj vangoj estas kiel bedoj de aromaĵo. Liaj lipoj estas kiel rozoj, ili gutadas fluidan mirhon.

"5.15 — Lia aspekto estas kiel Lebanon, majesta kiel cedroj."

La forteco, la energio, la belaj, la gracieco estas prezentitaj per arboj,

BOLIVARIANA PONTIFIKA UNIVERSITATO

Prof. Manuel Angel M., direktoro de la Departamento de Idiomoj de la Bolivariana Pontifika Universitato en Medellin, Kolombio, skribis en la 5-a de Junio leteron al B.E.L. kun peto pri informoj rilataj al E. kaj adresoj de esp-istaj asocioj.

Plenumante la peton, B.E.L. sendis diversajn presaĵojn.

fruktoj kaj floroj. La cerealoj montras fekundecon.

La simbola, heterogena kombinaĵo estas karakteriza kaj farigas komplika en rilato al la floroj. La blanka lilio, sespetala floro, prezentas la Eternan Vorton kaj ankaŭ la purecon kaj la ĉastecon. La floro de la figarbo prezentas la justecon; la bonodora rozo el la monto Galaad, la antikvan legon. La pomarba floro, kiu memorigas la misteron pri la malpermesita frukto, kiun Eva manĝis, la dian amon. El la aromaj plantoj ni ne povas ne mencii la grandvaloran nardon, la amaran nirhon, emblemon de pureco; la incenson, kies originon el la lando Saba la Sankta Biblio mencias.

Estis parfumo dediĉitaj al la Sinjoro, kaj la ofero al Dio estis simboligita de la "mistera parfumo": "oraj pelvoĵoj plenaj de incenso, kiuj estas la preĝoj de la sanktuloj" (Apokalipso, 5.8).

La ĝardeno Edena, la arbo de vivo, la arbo de sciado pri bono kaj malbono, la manao, ĉio elvokas en ni misterajn imagaĵojn kaj simbolojn. La paraboloj estas ne alie ol simboloj pli ampleksaj kaj klarigitaj. Kaj estas evidenta ties uzado en rekta rilato al la vegetaĵoj en la paraboloj de Jesuo.

Nenecese estas, vere, elstarigi la grandegan influon de la Biblio al la antikva poezio agro-paŝtita.

La evangeliisto montras al ni la riĉecon de la signifo, kiun nur poezia formo povas doni: "Pripensu la liliojn de la kampo, kiel ili kreskas; ili ne laboras, nek ŝpinas; tamen mi diras al vi, ke ĉe Salomono en sia tuta gloro ne estis ornamita, kiel unu el ĉi tiuj". (Sankta Mateo, 6.28-29)

El *Diário de Notícias* (13-8-1961)
tradukis A. Caetano Coutinho.

A GRUTA DE ITUAÇU

Stela Câmara Dubois

O que pode fazer a natureza
 No mistério de força e de beleza,
 E tudo quanto o olhar aqui atesta,
 Diante desse luxo e dessa festa!
 Enlaçados, a gôta e o minuto,
 Mudaram em obra de arte a treva e o

[luto.

A caverna é um palácio, é um primor!
 Guirlandas e florões no seu fulgor,
 Pendem da abóbada, graciosamente,
 Num estilo nôvo, límpido, fremente...

A medida que andamos, novas salas,
 Corredores, cortinas, sombras, valas,
 Candelabros, zimbórios, colunatas,
 Franjas de estofos a cair, oblatas
 De concreções calcáreas, subterrâneas
 Como a cantar, estranhas, instantâneas,
 As harmonias doces e mais belas,
 Colhidas, como as flôres mais singelas,
 E jogadas, ao léu, na gruta enorme
 Que em sonhos brancos, dia e noite,
 [dorme...

Catedral do silêncio, que há em ti?
 A majestade, a transcendência, eu vi!
 As estalagmites em colunas,
 Alvas, sedosas, como argêntas dunas,
 Parecem braços para os céus alçando,
 A luz do sol, em lágrimas, buscando.
 Multififormes facetas, plumas, crinas,
 Miléporas, em franjas cristalinas.

As estalactites, a realeza,
 Que fazem dessa gruta uma grandeza,
 Lampadários em lira, archotes, franças,
 Elmos, comas, penachos, esperanças
 Esculpidas em pedra, sensitivas,
 Milefólios, moléculas esquivas,
 Tudo, tudo, de Deus, do Seu poder,
 Numa demonstração mirífica de

[glórias,

de vitórias,
 de hosanas e aleluias
 ao Seu eterno Ser,
 insondável,
 impenetrável,
 incomensurável!

LA GROTO DE ITUAÇU

Trad. Leopoldo Knoedt

Le la naturo kreokapableco
 en la mister' de forto kaj beleco,
 al la rigard' prezentas sin atesto,
 antaŭ ĉi lukso, antaŭ tia festo!
 Artverkon el funebro kaj mallumo
 kreis moment' kaj guto en brakumo.
 Palaco estas la kavern', juvelo!
 Girlandoj kaj festonoj en brilhelo
 de l' volbo pendas, ĉarmaj, eleganciaj.
 en novaj stiloj, klaraj kaj vibrantaj.

Laŭgrade nia ir' aperas navoj,
 kurtenoj, koridoroj, ombroj, kavoj,
 kupoloj, lustroj, kolonplenaj stratoj,
 falantaj ŝtofaj frangoj kaj oblatoj
 el la subteraj tegoj sedimentaj,
 kvazaŭ kantante, strangaĵ kaj
 [momentaj,
 per harmonioj dolĉaj plej subtilaj,
 plukitaj kvazaŭ floroj plej humilaj,
 hazardŝutitaj tra la grot' giganta
 en blanka kaj ĉiama rev' dronanta...

Silenta katedral', vi kion gardas?
 Majeston kaj transcendon mi rigardas!
 La stalagmitoj en kolonaj kunoj,
 kvazaŭ argentaĵ, silkeblankaj dunoj,
 ja ŝajnas brakoj al ĉiel' turnitaj,
 serĉante la sunlumon, larmoŝvitaj.
 Kolharoj, plumoj kaj facetoj ŝanĝaj,
 koraliformoj en kristaloj franĝaj.

La stalaktitoj — la reĝeca digno,
 de la grandeco de ĉi groto signo!
 Lirformaj kandelabroj, branĉaj plantoj,
 kaskedoj, tufoj, kvastoj, torĉoj, mantoj.
 skulptitaj el la ŝtono, sensitivoj,
 kaŝemaj molekuloj, sempervivoj,
 ĉio, ĉio el Di' el Lia povo,
 en mirinda demonstro de triumfoj,

[glorioj,

de honoroj,
 de hozanaj kaj halelujaĵ
 al Lia eterna Esto
 nesondebla,
 nepenetrebila,
 neelmezurebla!

KOREKTO — *Prof-ing Stela Câmara Dubois estas ankaŭ aŭtorino de la bela poeziaĵo "Saluto al Esperanto" aperinta en nia numero de Jul-Dec. 1968; pro eraro estis menciita la nomo de la talenta tradukinto S-ro Leopoldo Henrique Knoedt.*

BRAZILA KRONIKO

CEARÁ

Fortaleza — S-ino Myriam de Aquino gvidas interesan Esperanto-rubrikon en la grava ĵurnalo "O Povo". Tiu gazeto estis fondita de nia karmemora samideano Demócrito Rocha, pioniro de E. en Ceará.

— D-rino Beny Moreira da Silva el Belém, post libertempa lernado ĉe Esperanto-Kurso de Universitato de Ceará, faris la elementan kaj superan ekzamenojn kaj ricevis la koncernajn diplomojn de B.E.L.. Ŝi instruos E-on en Universitato de Pará.

RIO GRANDE DO NORTE

Natal — La Junulara Esperanto-Klubo de Rio Grande do Norte ekfunkciigis E-kurson, kies lecionoj okazas ĉiusabate de la 14-a ĝis la 15-a h.

ALAGOAS

Maceió — D-ro Cícero Silva Pereira, inĝeniero kaj advokato, kiu antaŭ jaroj lernis E-on en Palmeira dos Índios kun la fama brazila verkisto Graciliano Ramos, loĝas nun en la ĉefurbo, kie instigata de kelkaj amikoj li intencas komenci kurson de la Internacia Lingvo. Ni deziras plenan sukceson al lia laboro.

BAHIA

Salvador — Nova estraro de Associação Baiana de Esperanto por la periodo 1968-1969 estis elektita kaj enoficigita en Ĝeneraa Kunsido de la 5-a de Julio de la pasinta jaro. Jen la nomo de la estraranoj: Prez. Prof. Godofredo de Araujo Goes, Vicprez. P-ino Vivaldina Magalhães Caymmi, 1-a Sek. S-ro Hermes Pitta, 2-a P-ino Mariana Cerqueira Lima; 1-a Kas. S-ro Alvaro C. Carvalhal, 2-a S-ro Edson Pedra, Bibl. D-ro José Siquara da Rocha, Konsil. S-roj Onias de Almeida, Leopoldo H. Knoedt kaj D-ro Edmilson Santana Moura. La estraro nomis la membrojn de la diversaj departementoj: kursoj, publikaj rilatoj, sociala, arta kaj virina.

— Associação Baiana de E. enskribas en la Movadon la lernantojn de siaj kursoj. Bona formo de varbado, plene imitinda.

Itabuna — Nia movado feliĉe reaktivigas. Laŭ informo de nia samideano S-ro Eudes B. Santos okazis la 28-an de Oktobro de la pasinta jaro en Centro Espirita Fraternidade malfermo de E-kurso sub la gvido de S-ro Lourival Pinheiro. La inaŭguran lecionon faris nia samideano D-ro Jenuino de Castro, loka ĵuĝisto. En la monato Marto rekomenciĝis malnova kurso, kies gvidanto estas ankoraŭ S-ro Otaviano Curvelo de Sousa. La esp-istoj de Itabuna kaj Ilhéus intime kunlaboras.

Itapetinga — Nia samideano S-ro Valdenício Santos, kiu jam instruas E-on al lernantoj de diversaj kulturgradoj, sukcesis interesigi pri nia afero la estraron, instruistaron kaj lernantaron de Centro Educacional Alfredo Dutra por malfermo de kurso de la Internacia Lingvo. Li ankaŭ aperigas en la gazeton "O Vigia", eldonatan de la lernantoj de la sama institucio informojn kaj instigon rilate nian lingvon.

Muritiba — Instituto Muritibana de Esperanto kaj Kulturo sendis al B.E.L. detalan raporton pri siaj poresperantaj aktivecoj, kiu donas bonan ideon pri la historio, nuna agado kaj planoj. La ĉapitroj havas jenajn titolojn: Kial Fondi Instituton?, Informaj Aktivecoj, Tra la Gazetaro, Tra la Radio, Pere de Festoj, Ĉe la Asocioj, Instruaj Aktivecoj, Konkludo.

MINAS GERAIS

Belo Horizonte — Jen la estraro de Esperanto-Societo de Minas Gerais, elektita la 29-an de Marto por la oficeperiodo 1969-1971: Prez. D-ro Carlos Rezende, Vicprez. Gen. Geraldo Pádua, Sek. S-ro Jayme Zatar Filho, Helpa Sek. F-ino Gercina Ribeiro, Kas. D-ro Rivadávia P. de Moraes, Helpa Kas. S-ro Mário Jorge de Assis, Bibl. S-ro Antônio Aleixo Martins.

Sete Lagoas — D-ro Wilson Veado Direktoro de la Fakultato de Edukado, komunikis al ni, ke li enkondukis Espe-

ranton en la liston de devigaj lernobjektoj de la Lingva Fako de tiu supera lernejo.

GUANABARA

Rio de Janeiro — Partoprenis la lastan filmofeston en Marto tri usonaj espistoj, sciencaj fikciaj filmoverkistoj: S-roj Forrest J. Ackerman, Harry Harrison kaj Philips José Farmer. Pro leterpeto de S-ro Ackerman al nia Delegito, B.E.L. komisiis S-ron Francisco de Assis Torres por kontaktigi kun ili tuj post ilia alveno la 22-an de la sama monato, kion efektive li faris laŭ la eblecoj, ĉar vere ili estis tre okupitaj de la festo.

— Estas malfermita kurso de la Internacia Lingvo ĉe Instituto Benjamim Constant (por blinduloj). Gvidas la kurson la sindona esperantisto S-ro Sylvio Pellico Machado, brazila delegito de la Internacia Ligo de Blindaj Esperantistoj. La presejo de Instituto Benjamim Constant jam preparis eldonojn de kelkaj esperantaj lernolibroj laŭ brazila sistemo.

SÃO PAULO

São Paulo — La grava gazeto "Diário Popular" aperigas serion da lecionoj de Esperanto, per iniciato de nia samideano Prof. Walter Francini. La esperanta fako de "Diário Popular" prezentas tre varian materialon, interalie: gramatikon, literaturon kaj novaĵojn pri la movado.

Caçapava — Majoro Gilberto Aquino da Silva Velho sukcesis aperigi en la lokajn ĵurnalojn "O Matutino Popular" kaj "O Caçapavense" artikolojn kun informoj pri E-o. Li organizis malgrandan Esperantan ekspozicion, kiu funkciiis en la magazeno "Verdilar" en la tagoj 10-14 de Aprilo. En la 13-a de Aprilo, datreveno de la fondo de la urbo ĝin vizitis karavano de 27 personoj el São Paulo gvidita de Prof. Walter Francini; la urbestro kaj lia edzino akceptis la vizitantojn en la urbdomo.

Caraguatatuba — S-ro Ângelo Barros de Araujo, profesoro de portugala lingvo en la ŝtata Kolegio, konstatinte la grandan intereson de siaj lernantoj por E-o, decidis komenci kurson de

la Internacia Lingvo en la monato Aŭgusto kaj tial sin turnis al B.E.L. kun peto pri la necesa materialo.

Catanduba — La Delegitino en Poti-rendaba, F-ino Maria Rosa De Angelis, faris la 5-an de Novembro de la pasinta jaro en la Fakultato de Filozofio Sciencoj kaj Beletristiko paroladon pri la temo "De Zamenhof ĝis la Nuna Tempo"; ŝin invitis D-ro Paulo Henrique Rocha Correia, direktoro de la Fakultato. La prezidanto de la Centro de Historiaj Studoj de la Fakultato, D-ro Vergílio Antunes, intencas enkonduki en la Centron la instruadon de E.

Pindamonhangaba — La 21-an de Junio okazis la 1-a Renkontiĝo de la Esperantistoj de Valo de "Paraíba" kun la partopreno de samideanoj el Taubaté, Caçapava, Volta Redonda, São José dos Campos, Jacareí, Paraibuna, São Paulo kaj aliaj urboj. Prof. Walter A. Francini faris interesan paroladon pri E. La renkontiĝo traktis pri diversaj aferoj rilataj al la Movado en la regiono. Oni decidis restarigi elementar kurson sub la orientado de nia samideano D-ro Waldomiro Benedito de Abreu, sindona loka gvidanto kaj kun la kunlaboro de la fervoraj esp-istoj S-roj Jairo Monteiro kaj Luiz Molinari.

São João da Boa Vista — D-ro José Rubens Ceschin, Prezidanto de la Komunuma Konsilantaro, per letero de la 18-a de Julio komunikis al B.E.L., ke laŭ propono de la konsilanto D-ro Jatur Gonçalves Vieira, tiu Konsilantaro decidis gratuli la Ligon pro la datreveno de la apero de la 1-a libro de E. La proponinto estas de multaj jaroj nia sindona samideano.

São Miguel Paulista — En la 18-a de Majo estis elektita kaj enoficigita la estraro de Esperanta Klubo Zamenhof por la periodo 1969-1970. Ĝia konsisto estas jena: Prez. S-ro Osvaldo Pires de Holanda, Vic-prez. D-ro Darryl Mendonça, Gen. Sek S-ro Oscar Moreira

Brazila Esperantisto petas al la estraranoj de la brazilaj kluboj kaj al la brazilaj delegitoj de U.E.A., ke ili sendu raportojn pri siaj informaj kaj instruaj laboroj.

Barros, 1-a Sek S-ro João Manoel Leitão, 2-a Sek. S-ro Sergio de Jesus Lopes, 1-a Kas S-ro Omar Coutinho Silva, 2-a Kas. S-ro Antonio Radica, Bibl. S-ro Nilton Antonio Araujo, Propag. S-ro Francisco Fernando Teixeira, Konsil. S-roj Ananias F. de Oliveira, Edson de Oliveira kaj Pedro Lopes de Carvalho.

PARANÁ

Curitiba — En la tagoj 13-a kaj 14-a de Julio okazis la 5-a Esperantista Renkontiĝo de Paraná sub la aŭspicio de Paraná Esperanto-Asocio, kies prezidanto S-ro Gert Druker prezidis la Malferman Kunsidon en la salono de "Cantina Macrobótica" je la 9-a. Ĉeestis reprezentantoj de pluraj asocioj esperantistaj kaj neesperantistaj. Oni faris specialan omaĝon al la veterana esp-isto S-ro Augusto Gonçalves de Castro por lia senĉesa laboro de preskaŭ duonjarcento. La ĥoro de la Legio de Bona Volo kantis Esp-ajn kanzonojn. Prof. Geraldo Matos prelegis pri la Internacia Lingvo. Ĉeestis 48 personoj. Je la 13-a h. tagmanĝis 14 personoj. Rimarkinda ero de la Renkontiĝo estis la trafa ekspozicio organizita de Prof. Pedro Real en la Publika Biblioteko de Paraná. La Renkontiĝo fermiĝis en la 14-a je la 20.30 h. kun aparta aludo al la dato. La lokaj ĵurnaloj radistacioj kaj TV-stacioj menciis favore la Esp-istan Kunvenon. La venonta Renkontiĝo efektiviĝos en Paraná en 1970.

— Jen la straro de Paraná E. A. elektita la 28-an de Aprilo de la pasinta jaro por la periodo 1968-1970: Prez. S-ro Gert Druker, Honora Prez. S-ro Augusto G. de Castro, Vicprez. D-ro Francisco José S. Portugal, 1-a Sek. S-ro Leonidas Silva, 2-a Sek. S-ro Hermanito O. Christensen, 1-a Kas. S-ro Natalina R. da Silva, 2-a Kas. D-ro Newton Sisti, Bibl. S-ro João Cabral dos Santos, Parol. S-ro João Maria Fontoura. En la sama tago oni elektis la Kontrolan kaj la Konsultigan Konsilantarojn.

SANTA CATARINA

Criciúma — Nia samideano S-ro Carlos Geiser denove agas kaj malfermis E-kurson.

BRAZILA KLUBO ESPERANTO

DEKO DA ESPERANTISTOJ JAM PRELEGIS ĈE B.K.E.

Kiel anoncote en la antaŭa numero, Brazila Klubo Esperanto organizis, en ĉi tiu jaro, serion da prelegoj en la Internacia Lingvo, kun partopreno de klubanoj inter ili kelkaj veteranoj de la movado.

Jen estas la listo de la prelegoj prezentitaj ĝis Aŭgusto 1969:

15-a de Marto: *Enkonduko en la esperantan literaturon* (Henerik Kocher).

29-a de Marto: *La ŝako — ludo, arto, scienco* (Florianio Pessoa).

12-a de Aprilo: *La esperanta proverbaro* (Jorge Campos de Oliveira).

10-a de Majo: *Esperanta fantazio* (Jozefo Joels).

24-a de Majo: *La moderna fiska tributsistemo* (Joel Vasques Manso).

7-a de Junio: *Kokinbredado* (Sebastião Domingues).

21-a de Junio: *Hispanujo: lando, lingvo, popolo* (Alfredo Maceira Rodríguez).

12-a de Julio: *La jarlibro de U.E.A.* (Jorge Campos de Oliveira).

26-a de Julio: *Kiel organizi kluban kunvenon* (Marcelina de Azevedo Carneiro).

2-a de Aŭgusto: *La homo: kemia maŝino* (Lazarus Brügger).

23-a de Aŭgusto: *Esperanta poezio* (Sylla Chaves).

Por estontaj prelegoj jam enskribiĝis aliaj samideanoj, ekzemple d-ro Diderot Freitas, kiu parolos pri Medicino.

Se vi havas interesan temon por prelego, kaj sufiĉe bone parolas Esperanton, venu kaj enskribiĝu ĉe B.K.E.

RIO GRANDE DO SUL

Porto Alegre — La grava ĵurnalo "Correio do Povo" aperigis en sia eldono de la 1-a de Aŭgusto interesan artikolon de D-ro Modesto Belmonte de Abreu sub la titolo "O Panglótico", en kiu la aŭtoro trafe pledas por E: kiel internacia lingvo.

JUNDIAÍ KAJ ESPERANTO

STRATO, PLACO KAJ MAGAZENO



Jundiaí, la konata fervoja centro en São Paulo, estas urbo interesa ankaŭ laŭ Esperanta vidpunkto.

En ĝi ekzistas tri faktoj, kiuj rilatas nian aferon: Placo Lázaro Luiz Zamenhof, Criador do Esperanto, Strato Esperanto, Idioma Internacional kaj Super-Mercado (Magazeno) Esperanto. Ni aperigas fotojn de la tabuloj de la du unuaj kaj ankaŭ foton de la tria.

La magazeno, kiu situacias proksime de la omnibusa stacio, estas proprajo de nia samideano S-ro Heitor Beltreschi, kiu en 1962 ricevis diplomon de B.E.L.. Antaŭ la magazeno oni vidas lin (dekstre kun okulvitroj kaj blanka ĉemizo), lian edzinon, liajn du filinojn kaj du bofratinojn; la ceteraj personoj estas dungitoj.

ORIGINALOJ DE D-RO ZAMENHOF (3)

Henerik Kocher

N-ro 8

*Letero presita en Danubo, Novembro
1910*

Varsovio, 23.XI.1910

Karaj Sinjoroj,

La unuan numeron de "Danubo" mi danke ricevis. Mi deziras al la nova gazeto plej bonan prosperadon. La nova organo, kiu per Esperanto ligas kelkajn popolojn, restas ĉiam simbolo de intergenta paco kaj amo.

Via L. L. Zamenhof

N-ro 9

*Letero presita en la Dek-sepa⁽⁶⁾
Februaro 1911*

Kara Sinjoro,

La unuan numeron de la DEK-SEPA mi ricevis kun plezuro kaj danko. Al via grupo mi sendas mian koran saluton kaj al ĝia organo mi deziras plej bonan sukceson.

Via L. L. Zamenhof

N-ro 10

*Letero presita en La Du Steloj⁽⁷⁾
Kara Kolego!*

La unuan numeron de Via tre bela revuo "La Du Steloj" mi ricevis kun plezuro kaj mi kore dankas. Mi sendas al Via revuo miajn plej bonajn dezirojn, kaj mi forte kredas, ke tiu revuo havos gravan signifon por nia afero en la tuta Suda Ameriko. Kun energio, pacienco kaj persisteco oni ĉiam kaj ĉie povas fari tre multe kaj mi estas konvinkita ke la diritaj tri ecoj neniam mankos al Vi. Mi ne dubas ke la nomo de Via Asocio kaj de Via revuo estos baldaŭ tre bone konata en la tuta mondo esperantista.

Via Zamenhof

N-ro 11

*Letero al Sro Robert Sada, presita en
La Kulturo (Gazeto de Bohema Labo-
ristaro Esperantista en Aŭstrio), Fe-
bruaro 1912*

Varsovio 15.2.1912

Kara Sinjoro!

Kun plezuro kaj danko mi ricevis la unuan numeron de Via gazeto "La Kulturo". Mi deziras al Via organo plej bonan sukceson, kaj mi esperas, ke ĝi certe ĝin havos. La apero de laborista gazeto en Esperanto ĉiam min tre ĝojigas, ĉar laŭ mia opinio por neniu la lingvo internacia kaj la esperantismo havas tiel grandan gravecon, kiel por la laboristoj kaj por tiu ideo, por kiu ili batalas.

Via Zamenhof

N-ro 12

*Letero al D-ro Dor, presita en La Mo-
vado, Aŭgusto 1912*

Tre estimata Doktoro,

En la nomo de mia edzino kaj de mi mem mi sendas al vi mian koran gratulon pro via festo. Mi bedaŭras, ke pro la iom tro granda malproksimeco mi ne povas ĉeesti persone en la rondo de la amikoj, kiuj ĉirkaŭos vin en la festa tago, tamen spirite mi certe estos kun vi. Mi esperas, ke la datreveno de via naskiĝo ripetigos ankoraŭ multe da fojoj, kaj trovos vin ĉiam en la plej bona stato.

Kun plej kora saluto,

Via, L. L. Zamenhof

⁽⁶⁾ Organo de "Groupe Espérantiste du XVII^e Arrondissement de Paris".

⁽⁷⁾ Organo de La Ĉila Esperantista Asocio.

Fino

PLENA
GRAMATIKO
DE
ESPERANTO

I VOL. NCR\$ 20,00

II VOL. NRC\$ 25,00

GUTOJ DA VIVO

Paulo Lima Trindade

La momentoj da feliĉo estas kiel oazoj dissemataj sur la vasta dezerto de l'vivo.

Alvenas pli frue al tombo tiu, kiu prefere elektas la vojon de malpacigo...

Amikoj faritaj ĉe glaso estas ne amikoj sed kunkulpuloj...

Admiru la stelojn, sed memoru ekbruligi vian kandelon sur la tero...

Multaj predikas amon al Dio sammaniere, kiel aliaj konsilas legadon de iu libro, kiun ili neniam legis...

Kiu restas ĉe la dornoj, tiu neniam atingos la rozon...

Kiam vi pardonas, la ĉieloj montriĝas pli bluaj antaŭ viaj okuloj.

Vi havas kurantan konton ĉe la Eterneco. Kontrolu ciam vian saldon.

Penu lerni, profitante el malvenkoj...

Flustru preĝon en la kvieteco de dezerto kaj Dio aŭdos.

Trad. *Gilson Vilas Boas Passos*, Vitoria.

STATA SUBVENCIO POR 1969

La Leĝo n-ro 1.787 de la 5-a de Decembro 1968, kiu difinas la Buĝeton de Stato Guanabara por 1969, destinas la sumon de NCr\$ 2.000,00 kiel subvencion al Brazilo Esperanto-Ligo.

Série Epoko. Primorosas traduções de eminentes autores. Cada volume: NCr\$ 4,00.

La Princo kaj Betty. Wodehouse (Bardash).

La Tempo-Maŝino. Lando de la Blinduloj. Wells (Amos).

Princino de Marso. Burroughs (Sturmer).

Colomba. Meimée (Beau).

Sep Vangojrapoj. Aszlányi (Spierer).

Brulanta sekreto kaj aliaj rakontoj.

Zweig (K. R. e P. E. Schwerin).

Kiso de la Reĝino. Najivin (Staritsky).

La Karnavalo kaj la Somnambulino.

Immermann (Wohlthat).

54-a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO

La Ministerio por Eksterlandaj Aferoj, plenumante peton de B.E.L., komunikis al ni per letero de la Ajunkta Ĝenerala Sekretario por Internaciaj Organizadoj, ke la Brazilo Ambasadoro en Finnlando nomis la Sekretarion S-ron Danilo Adão Mayr por akompani kiel brazilo observanto la laborojn de la 54-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko (26 Aŭg. — 2 Sept. 1969).

DE ZAMENHOF

ORIGINALA VERKARO

Prefácio, artigos, tratados, discursos, cartas, poesias — coligidos e ordenados pelo Dr. J. Dettlerle.

Enc. NCr\$ 32,50

LETEROJ

A tragédia da vida de Zamenhof revelada pela sua correspondência recentemente descoberta. Apresentação e comentários do Prof. G. Waringhien.

2 volumes enc. NCr\$ 37,50

P O E S I A

Kalocsay, Waringhien, Bernard

PARNASA GVIDLIBRO

A métrica em Esperanto

— A arte poética —

Dicionário de rimas —

2.^a edição NCr\$ 14,00

Brendon Clark

KIEN LA POEZIO?

Princípios — Poemas originais e traduzidos —

— Sinônimos NCr\$ 15,00

NOVAJ MEMBROJ

Aracaju

Djalmyr Brandão de Carvalho Melo
Cremildes Maria Barbosa
Eviluzia Campos Nascimento
Ligia Carvalho Leite
Demostenes Cesar Alves Franca
Climério Costa Prado
Evandro Silva dos Reis
José de Sousa Melo
Dayse Maria Brandão de Carvalho Melo
João Batista dos Santos

Salvador

Adilson Menezes Nascimento
Luiz Emidio dos Santos
Ardeckiria Albergaria de Jesus Perez
Tania Marisa Barreiros de Britto
Joel Carlos de Almeida
Ademar de Almeida Sena
Wanda Seixas Fraga e Silva
Ildefonso do Espírito Santo
Marysses Bomfim de Aragão
Maria Edna Spinola
Sonia Maria Spinola
Jurandyr Kuhim de Souza
José Leal Ferreira
Pedro Ferreira de Brito
Maria da Conceição Leal
Yolanda Criaes Souto Maior
Wilde Campos de Araujo
Suzete Maria Fonseca Dias
Aydê Martins Barreto
Arlindo Freire Branco Coêlho
Almerinda Rocha Santos
Milton Francisco da Cunha
Edson Guimarães Pedra
Arabela Dimas Ninck Carteador
José Luiz do Nascimento Junqueira
João José de Oliveira Junqueira

Amargosa — BA

José Oliveira Lima

Belo Horizonte

Maria Eponina T. Resende
Geraldina Moreira Duarte
Maria Madalena M. da Silva
Edwaldo Januário Marques
Paulo Gonçalves Monteiro
Edir Soares

Machado — MG

Paulo Afonso de Carvalho

Resplendor — MG

Claudio Fernandes Leal

Viçosa — MG

Mauricio Fernandes de Castro

Rio de Janeiro

Maria Lúcia Novais de Almeida
Lucimar Magalhães Nunes
Rolcineia de Almeida Cipolatti
Wilson Nasser Sleiman
José Nilson Silva Serra
Rolcinei Paulo de Almeida Cipolatti
Aloisio Pereira Braga
José Carlos do Carmo Thomaz

Guarujá — SP

Haroldo da Rocha Freitas Neiva

Marília — SP

Maria Estela Ambrosio
Yasuko Kunijoski
Miguel Silva
Maria Celina Battistella

Mogi das Cruzes — SP

Cosme Damião Pessoa de Lacerda

Santa Cruz do Rio Pardo — SP

Luiz Marchesi

Curitiba

Isr. Rodrigues

Porto Alegre — RS

Juely Cidade
Sheila Almeida
Ivone Rodrigues

Rio Grande — RS

Ivone Franco Nunes
Ivone Franco Nunes

Rosário do Sul — RS

Francisco Pinheiro Ramos

La Paz — BOLIVIO

Lucy Sanches Loza

VARBU NOVAJN MEMBROJN